

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Alia sukcesa renkontiĝo estis la 6-a Mekaro en Toronto

Francisko Gauthier

Mi ĵus alvenis el Toronto, kie mi partoprenis en la 6-a Mez-Kanada renkontiĝo, evento kiu plej eble estos la pinto de mia ĉijara Esperantista vivo. Renkontinte plurajn homojn por la unua fojo, vidinte plurajn amikojn jam renkontitajn en aliaj eventoj, vizitinte la urbon kaj koninte kelkajn el ĝiaj kulturaj apartaĵoj, mi nun ekkonscias kiom Mekaroj estas gravaj por la Kanada Esperantista medio.

Certe la vojo estis longa al Toronto por mi, Tririverano, sed ĉu tion vi rimarkas kiam

vi havas la eblecon interkonatiĝi survoje kun novaj Esperantistoj? Kun Gregorio, Francisko, Normando kaj Suzana, tiu vojo tute ne ŝajnis kiel 7-hora vojaĝo. Alveninte, ni iris al la gastejo porti niajn valizojn kaj post kvin minutoj, ni jam komencis revidi niajn amikojn el 12 malsamaj urboj! Efektive, ĉeestis Esperantistoj de Montrealo, Otavo, Kingston, Toronto, Peterborough, Londono (Kanado), de pluraj urboj en Usono kaj eĉ de Angla deveno!

Post nia alveno, je la kvara kaj duono posttagmeze, ni havis multe da tempo por babili surloke, kaj estis io bona kaj io malpli bona pri tio. Certe estis plaĉe havi novaĵojn de malnovaj amikoj, scii pri iliaj vivoj kaj evoluoj, kaj scii pli pri tiuj personoj kiuj estis novaj al mi, interalie novaj Esperantistoj, tio ne donas iun ajn dubon. Sed kiam, ĉirkaŭ la sesa, kiu estis la antaŭdecidita horo por manĝi, ni sciis ke, kaŭze de problemo, ni devos atendi plian horon, mia stomako komencis digesti sin mem. Bonŝance, ni povis kalkuli je la elturniĝemo de la Torontaj Esperantistoj, kiuj helpis nin forgesi niajn malsatojn per vizito al la Ontario parlamentejo. Tie estis prenitaj fotoj kiuj senmortigos la even-



Esperantistoj el 12 urboj antaŭ la ontaria parlamentejo

ton por ĉiam. Ni poste piediris ĝis ne bedaŭrata Ĉina restoracio, kie mi ankoraŭ interkonatiĝis kun emerita sociologo kun kiu mi havis delonge ne atingitan viglan kaj interesan diskuton.

Poste estis «kultura vespero» en kiu estis liberaj prezentoj por la malfermo de la tago. Ni havis la eblecon aŭskulti pianmuzikon kaj kanti kune, agado kiu ĉiam donas al mi unikan senton, ne traviveblan en la ĉiutaga rutino. Ni ankaŭ devis altiri niajn mensajn kapablojn tra amuza diven-ludo, kaj poste

ni aŭdis beleganan poemon Estas Mi Esperantisto legitan de Parkero, kaj Francisko Lorrain paroladis al ni pri siaj genuoj.

La morgaŭon, interesa matenmanĝo estis organizita sed bedaŭrinde, ŝajnas ke la Torontaj Esperantistoj ne havas multe da ŝanco kun la restoracioj ĉar ne estis loko en tiu ĉi por ni ĉiuj. Do mi, Normando, Ŝajo kaj Gregorio iris al Allan Gardens, interesa publika ĝardeno tute senpaga, por havi, plie, senpagan gviditan viziton de... Ja, mi ne bezonas diri de kiu.

Poste, ĉiuj kunvenis en la kunvenejo por diskuti pri la fareblaĵoj. Estas interese rimarki ke multe da ebloj estis proponitaj al la grupo, kaj ke neniuj energio estis malŝparita por kelkaj proponoj kiuj, fine, interesis neniun. Kvar proponoj estis faritaj kaj, fine, la grupo elektis du el ili, kiuj estis vizito al la Arta Galerio de Ontario kaj gvidita vizito de la Toronta arkitekturo, preparita de Skoto, Toronta Esperantisto.

Tiu vizito, kvankam petante multe da piedirado, estis interese por mi ĉar mi havis la eblecon vidi kaj travivi la Torontan etoson dum tuta posttagmezo. La vizititaj lokoj estis ankaŭ memoreblaj, ĉefe la malnova distilejo, kiu kovras multe pli da



tereno ol mi povis imagi. Sed mi ne multe memoras pri la distilejo, pro tio ke mi prenis tiun tempon por interkonatiĝi kun la plej malbone konataj Esperantistoj kiujn mi trovis. Ankaŭ tio estas notebla, ĉu ne?

Poste, la tuta grupo iris manĝi en malsamaj barataj restoracioj, ago elektita de ni ĉiuj en antaŭa kunveno. Estas interese ĉi tie noti ke la Torontanoj estis pretaj ricevi la emojn de la grupo kaj adaptiĝi al ili. Se estus kelkaj kiuj ne ŝatus iri al barata restoracio, aliaj proponoj estis pretaj.



Legado de la poemo *Estas Mi Esperantisto* de Parkero

Revenante, filmovespero estis proponita. Mi ne scias kiuj filmoj estis aŭskultitaj, ĉar mi ne tute emis fari tion. Kiel relative nova Esperantisto kiu ankoraŭ bezonas plibonigi mian lingvokonon, mi pensis ke aŭskulti filmon estis multe tro pasiva agado por ke indus mia ĉeesto, kaj ke filmon mi povas rigardi iam ajn hejme. Certe tiu agado povus esti interesa por spertaj Espe-

rantistoj kiuj volas disvolvi sian kulturon pri la Esperantistaj eldonaĵoj, sed substrekinda estas la fakto ke ĉiam estos pli da spertaj Esperantistoj ol da novaj. Nu, ĉu tio signifas ke la agadoj devas esti pensitaj por la spertaj pli ol por la novaj? Tio estas grava demando, kaj mi pensas ke ĝi devas esti solvita antaŭ ol fari horaron por tiuj eventoj, ĉefe kiam oni volas kunigi ĉiujn Esperantistojn en la sama agado. Ĉu meza nivelo da sperto gravas por elekti tiujn agadojn? Se jes, kio estos la efiko de tiuj ne-lernigaj agadoj sur la novaj Esperantistoj?



Gvidita vizito de Toronto, de Skoto

Bonŝance, Parkero kunportis interesan ludon el kiu la ne-filme-muloj profitis, irante en drinkejon por ludi kaj babili kune ĝis la mateno, travivante sen mia scio unu el la plej belaj partoj de la semajnfino. Kaj ĉio. En la morgaŭo, mi devis foriri frue en la mateno. Tiel mi havis riĉan semajnfino plenon je diversaj spertoj en ne-kutima etoso, kaj faris kolekton da ideoj proponotaj al la Tririvera klubo por la venonta Mekaro en 2010.



Esperanto-Societo Kebekia **Société québécoise d'espéranto**

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Redaktado : Normando Fleury (informo@esperanto.qc.ca). Grafismo kaj muntado : Francis Gauthier. Estraranoj de ESK : Boris-Antoine Legault (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Normand Fleury (kasisto), Suzanne Roy (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2009.09.01

La Riverego (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction : Normand Fleury (informo@esperanto.qc.ca). Graphisme et montage : Francis Gauthier. Administrateurs de la SQE : Boris-Antoine Legault (président), Martin Benoit (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire), Normand Fleury (trésorier), Suzanne Roy (conseillère).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca



Latinamerika vespero

Zdravka Metz

Lastan vendredon de Aprilo estis planita komuna, tema vespermanĝo. Post etaj miskomprenoj, ĝi ja okazis, pli spontane ol organizite. Pro tio nur ses personoj dividis diversajn bongustajn dolĉajn kaj salajn pladojn, tostis per ruĝa vino kaj gustumis herban «mate-»teon el originala kukurbeta teujo.

Post la manĝo alvenadis aliaj personoj pretaj por babili kaj lingve interŝanĝi. Post la amuza sinprezentado de ĉeestanoj, tiuj kiuj volis rakonti spertojn, anekdotojn el Argentino, Brazilo kie la steloj malsamas, kie oni konfuziĝas orientante sin pere de suno, kie blovas malvarma suda vento kaj norda varma vento, kiu kaŭzas kapdolorojn. Kelkaj memoris pri Kubon, kongreslandon en 1990 kaj denove en 2010.

Pri aĵo kiel sia naskiĝlando rakontis Johano, kiu ekas novan projekton – kunlaboron pri lia biografio kaj historio de diversaj movadoj, en kiuj Johano partoprenas.

Menciindas ke, por ĉi tiu vespero venis Stefano el Gatineau, Tamara kaj Jozefo el Ĉikutima regiono, Suzana el Tri-Riveroj, do estis vera ESK-vespero.

Samtempe ĉi tiu vespero estis por Tamara adiaŭa vespero. Ŝi finis studjaron en Montrealo kaj ŝi plu zorgos pri Arboflora, sia entrepreno, kiu loke distribuas plantidojn. Jam meze de Julio, Tamara forflugos Eŭropon kun siaj du filinoj. Ili ne nur partoprenos E-kongresojn, sed poste restos vivi en Germanio, Berlino dum unu jaro, kie Tamara daŭrigos studadon pri verda arkitekturo.

Ni deziru al ili tri sukceson en ilia nova vivo.

Samtempe ni invitu Esperantistojn en MEDO-n por alia kaj la lasta vespermanĝo antaŭ Septembro, do la 29-an de Majo. Notu ke por la vespermanĝo necesas informi Normandon tri tagojn antaŭe. La temo estas Azio – do, kunportu aziecan pladon.

Dankon!

Vizitis nin en printempe 2009

Normando Fleury

SinJORINO Cui Jianhna el Nanjing, Ĉinio, vizitis nin survoje al Rimusko en Marto. Ne estis ŝia unua vizito en Montrealo, ĉar ŝi studis la Francan en UQÀM en 1993.

Nun ŝi estras la fremdlingvan departamenton ĉe Universitato de Nanjing kaj organizas interuniversitatan interŝanĝon de studentoj. Tiaj ŝivenis al Kebekio, potrakti interŝanĝon kun UQÀR en Rimusko. Ŝi ankaŭ faras eksperimenton pri lingvolernado. La projekto estas internacia inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Ili planas instrui Esperanton dum jaro kaj poste la Francan aŭ la Anglan al tiuj studentoj kaj kompari kun studentoj kiuj ne unue lernis Esperanton. Ŝi ankaŭ menciis ke ŝi organizis lingvan festivalon en Nanjing kaj miloj da homoj partoprenis. Eblis lerni intensive 60 lingvojn dum du tagoj (naŭ horoj) kaj la due plej populara lingvo, post la Angla, estis Esperanto kun 1500 partoprenantoj.

Poste vizitis nin komence de Aprilo sinjoro Adas Vadminas el Kaunas, Litovio. Li estas profesie ĉiĉerono kaj vizitis tiom da landoj en Azio kaj Eŭropo ke estus tro longe listigi ilin. Estis lia unua vizito al Kanado. Lia filino loĝas apud NovJorko kaj li decidis veni viziti Montrealon, Kebekon kaj Otavon ĉar nun Litovoj ne plu bezonas vizon por viziti Kanadon. Li parolas, krom la Litovan kaj Rusan, ankaŭ la Francan, Anglan kaj Hispanan. Li ofte gvidas grupojn al Francio, Hispanio kaj Italio sed ankaŭ ĉie tra Eŭropo. Li ne povas multe aktivi en la E-Movado ĉar li estas en Litovio nur kelkajn semajnojn jare. Ŝajne ke li ŝatas vivi en valizoj!

Komence de Majo vizitis nin sinjorino Mireille Grosjean, kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES). Ne eblus listigi ĉion kion ŝi faras por la movado. Ŝi parolis pri siaj spertoj vivi en Japanio, Ĉinio kaj Koreio dum jaro. Mi nur diru ke ŝi okupiĝas pri la lingvaj ekzamenoj de UEA, tradukas, verkas, instruas, ekzamenigas, prelegas kaj multe pli. Ŝi diris al mi ke kiam ŝi laboris kiel instruistino ĉe mezlernejo, ŝi ne havis liberan minuton. Nun ŝi estas emerita kaj ŝi ne plu havas liberan sekundon!



Cui Jianhna Ĉinio kaj Zdravka Metz



Adas Vadminas el Kaunas, Litovio



Mireille Grosjean, kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo



AKADEMIO DE ESPERANTO

Oficialaj Informoj n-ro 11

Listo de Rekomendataj Landnomoj kaj ŝanĝoj en la statuto

La 15-an de Marto 2009 la Akademio de Esperanto finis du voĉdonadojn. Unu temis pri Listo de Rekomendataj Landnomoj ellaborita de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. La alia temis pri du ŝanĝoj en la statuto de la Akademio.

Estis aprobitaj kaj la proponitaj ŝanĝoj de la statuto, kaj la proponita dokumento pri landnomoj.

La nova Listo de Rekomendataj Landnomoj estas ĝisdatigo kaj revizio de decido el 1989. Ĝi entenas nomojn de ĉiuj nunaj landoj, kiuj estas membroj de UN, kaj ankoraŭ la nomojn de kelkaj pliaj landoj (inkluzive de tri landoj, kiuj malaperis aŭ disiĝis post 1989). Jen mallongigita prezento de la rekomendataj nomoj:

Afganujo/Afganio; Albanujo/Albanio; Alĝerio; Andoro; Anglujo/Anglio; Angolo; Antigvo kaj Barbudo; Argentino; Armenujo/Armenio; Aŭstralio; Aŭstrujo/Aŭstrio; Azerbajĝano; Bahamoj; Bangladeŝo; Barato (=Hindujo/Hindio); Barbado; Barejno; Belgujo/Belgio; Belizo; Belorusujo/Belorusio; Benino; Birmo; Bocvano; Bolivio; Bosnujo/Bosnio kaj Hercegovino; Brazilo; Britujo/Britio; Brunejo; Bulgarujo/Bulgario; Burkino; Burundo; Butano; Centrafriko; Ĉado; Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio; Ĉeĥujo/Ĉeĥio; Ĉilio; Ĉinujo/Ĉinio; Danujo/Danio; Dominika Respubliko; Dominiko; EburBordo; Egiptujo/Egiptio; Ekvadoro; Ekvatora Gvineo; Eritreo; Estonujo/Estonio; Etiopujo/Etiopio; Fiĝio; Filipinoj; Finnlando; Francujo/Francio; Gabono; Gambio; Ganao; Germanujo/Germanio; Grekujo/Grekio; Grenado; Gronlando; Gujano; Gvatemalo; Gvineo; Gvineo Bisaŭo; Ĝibutio; Haitio; Hindujo/Hindio (= Barato); Hispanujo/Hispanio; Honduro; Hungarujo/Hungario; Indonezio; Irako; Irano; Irlando; Islando; Israelo; Italujo/Italio; Jamajko; Japanujo/Japanio; Jemeno; Jordanio; Jugoslavujo/Jugoslavio; Kaboverdo; Kamboĝo; Kameruno; Kanado; Kartvelujo/Kartvelio; Kataro; Kazaĥujo/Kazaĥio; Kenjo; Kipro; Kirgizujo/Kirgizio; Kiribato; Kolombio; Komoroj; Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa); Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila); Kosovo; Kostariko; Kroatujo/Kroatio; Kubo; Kuvajto; Laoso; Latvujo/Latvio; Lesoto; Libano; Liberio; Libio; Liĥtenŝtejno; Litovujo/Litovio; Luksemburgo; Madagaskaro; Makedonujo/Makedonio; Malajzio; Malavio; Maldivoj; Malio; Malto; Maroko; Marŝaloj; Maŭricio; Maŭritanio; Meksiko; Mikronezio; Moldavujo/Moldavio; Monako; Mongolujo/Mongolio; Montenegro; Mozambiko; Namibio; Naŭro; Nederlando; Nepalo; Niĝerio; Niĝero; Nikaragvo; NordKoreujo/NordKoreio; Norvegujo/Norvegio; NovZelando; Omano; Orienta Timoro; Pakistano; Palaŭo; Panamo; Papuo-NovGvineo; Paragvajo; Peruo; Pollando; Portugalujo/Portugalio; Ruando; Rumanujo/Rumanio;

Rusujo/Rusio; Salomonoj; Salvadoro; Samoo; Sankta Kristoforo kaj Neviso; Sankta Lucio; Sankta Vincento kaj Grenadinoj; Samarino; Santomeo kaj Principeo; Saŭda Arabujo/Saŭda Arabio; Sejŝeloj; Senegalo; Serbujo/Serbio; Siberio; Sieraleono; Singapuro; Sirio; Skotlando; Slovakujo/Slovakio; Slovenujo/Slovenio; Somalujo/Somalia; Sovetio, SovetUnio; Srilanko; SudAfriko; SudKoreujo/SudKoreio; Sudano; Surinamo; Svaŭlando; Svedujo/Svedio; Svislando; Taĝikujo/Taĝikio; Tajlando; Tajvano; Tanzanio; Togolando; Tongo; Trinidado kaj Tobago; Tunizio; Turkmenujo/Turkmenio; Turkujo/Turkio; Tuvalo; Ugando; Ukrainujo/Ukrainio; Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj; Urugvajo; Usono; Uzbekujo/Uzbekio; Vanuatuo; Vatikano; Venezuelo; Vjetnamujo/Vjetnamio; Zambio; Zimbabvo.

La statutaj ŝanĝoj koncernas la regulojn pri reelektado de Akademianoj kaj la metodojn de voĉdonadoj, kiuj nun povas okazi ankaŭ per elektronikaj rimedoj.

La novan version de la statuto kaj la plenan dokumenton pri landnomoj la Akademio baldaŭ publikigos en sia TTT-ejo ĉe: <http://akademio-de-esperanto.org>.

La Estraro de la Akademio de Esperanto interkonsente kun la direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro: John Wells, prezidanto, Brian Moon, vicprezidanto, Probal Dasgupta, vicprezidanto, Renato Corsetti, sekretario, kaj Bertilo Wennergren, direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

(Fonto: Ret-Info — <http://www.eventoj.hu>)

IJK en Kubo

Federico, TEJO-volontulo

La Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kun ĝojo anoncas kaj informas, ke ĝi venis al la decido ke la 66-a Internacia Junulara Kongreso, IJK, okazu en Los Cocos, Santa Cruz del Norte, Kubo.

Post longa kaj serioza diskutado pri ĉiuj alvenintaj kandidatiĝoj, Esperantistoj el Kubo montris la plej taŭgajn kondiĉojn. IJK okazos de la 24-a ĝis la 31-a de julio en 2010, tuj post la UK. Pliajn informojn pri la 66-a IJK la Estraro donos dum la venontaj monatoj. (Fonto: Ret-Info — <http://www.eventoj.hu>)



La starpunkto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) pri lingvaj rajtoj

Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiu rajto devas esti protektata ĉefe por malgrandaj grupoj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas minoritatajn lingvojn ekde pli ol 100 jaroj.

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo, sed estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante sian gepatran lingvon, kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), ilia ĝenerala progreso estas pli bona kaj ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo. Se ilia instruado en la gepatra lingvo okazas nur dum unu aŭ du jaroj, kaj poste ili devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, eble ili bone sukcesas tiel komence, sed ĉirkaŭ ekde la kvara lernojarlo, ilia progreso malrapidiĝas, kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas. Ankaŭ tio estas grava ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA rekomendas lerni du, tri aŭ kvra lingvojn, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. La gepatran lingvon
2. La regionan lingvon, se malsamas
3. La nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj
4. Internacian lingvon, kiu apartenas al neniun nacio, kaj kio estas: Esperanto.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas strebi al paco inter popoloj, plifaciligante la komunikadon kaj igante tion pli justa. Uzo de komuna lingvo evitas tian situacion, en kiu la personoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

Ni dezirus ke Unuiĝintaj Nacioj pripensu tiun temon koncerne siaj propraj kunvenoj. La diferenco estas tre evidenta kiam oni aŭdas partoprenantojn, kiuj sin esprimas en la Angla, la Franca aŭ la Hispana, kaj por kiuj tiu estas ĉu la dua, ĉu la tria lingvo. Kiam parolanto ekparolas uzante sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas impresa - kion li diras, havas multe pli da pezo kaj multe pli allogas la atenton, ol parolanto kiu utiligas fremdan lingvon. La granda espero de Esperantistoj estas ke la mondo iĝas pli paca loko, kaj ni kredas ke efika komunikado ludas tre grandan rolon por atingi tiun celon.

Referenco: Deklaro pri rajtoj de personoj apartenantaj al naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj, adoptita de la Ĝenerala Asembleo, rezolucio 47/135, je la 18-a de Decembro 1992.

Nova Koresponda Servo - kun fotoj!

Viktor Kudrjavcev

Ekfunkciis nova internacia esperantista koresponda servo kun la nomo «Koresponda Servo Universala, KSU».

La Servon iniciatis Viktor Kudrjavcev, redaktoro de la revuo Komencanto. La servo facilas por uzo kaj preskaŭ ĉiuj korespondanoncoj kunhavas fotojn!

Adreso de la servo: <http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/>
Krom plumamikaj, Koresponda Servo Universala akceptas ankaŭ alispecajn anoncojn kaj informojn!

(Fonto: Ret-Info — <http://www.eventoj.hu>)



Esperanto sur 64 milionoj da balotiloj - definitive!

Ulrich Matthias, vicprezidanto de EDE-Germanio

Laŭ decido de la balota komisiono de la 10-a de Aprilo, la Germana sekcio de la politika movado «Eŭropo - Demokratio - Esperanto» (EDE) rajtas partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009 en Germanio. Tio signifas, ke ĝis la komenco de Junio la Germana ŝtato presigos almenaŭ 64 milionojn da balotiloj, sur kiuj troviĝas ĝia nomo. Ankaŭ la nomoj de la 10 kandidatoj de EDE-Germanio - kun prof. D-ro Reinhard Selten sur la unua loko - troviĝos sur ĉiu voĉdonilo.

EDE starigas listojn ankaŭ en ĉiuj regionoj de Francio, tiel ke entute ĉ. 108 milionoj da Eŭropanoj (64 milionoj en Germanio kaj 44 milionoj en Francio) havos la eblecon subteni la disvastigon de Esperanto per sia voĉo. Dum en Germanio ĉiu voĉdonanto aŭtomate trovos EDE sur la balotilo, en Francio oni bezonas specialan voĉdonilon. EDE planas presigi kaj disdoni sep milionojn da ili, kaj krome oni ofertas la eblecon elŭti ilin el interreto.

En Germanio entute 32 partioj kaj politikaj asocioj partoprenos la balotojn - pli ol iam ajn antaŭe. Jam nun ĵurnalistoj publikigis la opinion, ke tiu ĉi abundo povus instigi la grandajn partiojn

akcepti ideojn de la novaj politikaj movadoj. Tiel ankaŭ EDE esperas, ke ĝia baza ideo, plibonigi la kompreniĝon pere de Esperanto kaj tiamaniere akceli lingvan egalrajtecon kaj demokration sur Eŭropa nivelo, ekhavas novajn impulsojn.

Pro al la partopreno en la balotoj, EDE povos senpage elsendi varbajn filmetojn en la germana kaj franca televido. Krome oni klopodas multe informi ekzemple pere de afiŝoj, faldfolioj, informstandoj kaj gazetaraj komunikoj. Eĉ se (pro la neceso superi la 5 %-an sojlon en Germanio kaj Francio) la akiro de seĝo en la parlamento ne ŝajnas esti realisma, nun milionoj da homoj ekscios pri la ekzisto de Esperanto, tiel ke certe ankaŭ la ĝenerala Esperanto-movado profitos de la balotoj.

Laŭ realisma takso, EDE povos atingi en Germanio kaj Francio sume ĉ. 100.000 voĉojn. Jam tia nombro certe pli impresus la eksteran mondon ol la membronombro de la diversaj Esperanto-asocioj en Eŭropo. La eŭropaj balotoj do povas grave helpi en tio, ke oni prenos la Esperanto-movadon pli serioze. (Fonto: Ret-Info — <http://www.eventoj.hu>)

Kien la Esperanto-Societo Kebekia?

Où l'auteur se désespère de l'avenir de la SQE.

Sylvain Auclair

Nia Kebekia societo fondiĝis antaŭ pli ol dudek-kvin jaroj. De tiam, membroj venis kaj iris — dum ni esperis, eble naive, ke la membraro kreskos per ada aldono de novaj membroj — kaj aktivaj membroj, ĉefe estraranoj, same venis kaj iris. Ofte, iu agas kiel estrarano dum kelkaj jaroj kaj poste foriras, foje eĉ forlasas la Societon.

Male de tio, ekde la komenco membras en la estraro Normand Fleury, kiu longe agadis kiel prezidanto; mi devas aldoni, ke, kvankam mi ne estis tiel fidela kiel li, ankaŭ mi pasigis multajn jarojn en la estraro, kiel sekretario, kasisto kaj/aŭ redaktoro de La Riverego, kiun mi fondis.

Tio laŭ mi konstitigas gravan problemon.

Ĉio ŝajnas, kvazaŭ la societo estus persona kreaĵo kaj posedaĵo de Normando kaj de Zdravka Metz, ofte kun mia helpo, al kio

aliaj Kebekiaj Esperantistoj foje partoprenas, se ili havas emon kaj tempon, preskaŭ ĉiam post rekta invito de Normando, kaj de kio ili atendas kursojn, interesajn aranĝojn, ĝenerale aktivadon por kaj per Esperanto. Estas kvazaŭ neniu krom Normando sentus sin respondeca pri la societo kaj pri la Esperantista vivo en Kebekio.

Ekzemple: mi estis kasisto dum multaj jaroj. Iom teda laboro, kiun mi esperis, ke iu alia transprenos. Iu nova, respondeca, kiu portos novajn fortojn al nia Societo. Finfine, iru vidi en la kolofono, kiu iĝis kasisto...

Iam ni ĉesos agadi. Ĉu la societo plu vivos post tiam?

Sed eble ni ne plu bezonas societon. Aliĝoj malkreskas, kursoj ne plu okazas, preskaŭ ne plu iu ĉeestas la vesperojn, semajnfinajn aranĝojn ni eĉ ne plu organizas... Kien do?





Encore l'accusatif!

Sylvain la korektisto Auclair

Zamenhof, le créateur de l'espéranto, a vraiment été bien inspiré quand il a décidé de munir sa langue d'un accusatif. Sans cette décision, nous aurions bien moins de matière, nous les auteurs d'articles sur les difficultés... oups! je voulais dire les *particularités* de l'espéranto.

Or donc, une demande spéciale de F.G.: «Mi proponas artikolon pri la akuzativo, kiam la objekto estas disigita de la verbo per prepozicio kiel per, pri, en... kiam oni devas uzi la akuzativon kaj kial ne? Tio donas al mi malfacilecon.»

Si l'on excepte les prépositions de lieu (principalement *sur*, *en*, *sub*, mais aussi *inter*, *apud*, *ĉirkaŭ*, *antaŭ*, *malantaŭ* et *ĉe*), où l'usage de l'accusatif montre la direction plutôt que l'état (*mi kuras en la domo*: je cours dans la maison — *mi kuras en la domon*: j'entre dans la maison en courant), on n'utilise jamais l'accusatif après une préposition. L'accusatif comme la préposition servent à indiquer des fonctions; or chaque mot n'a dans une phrase qu'une seule fonction. Ainsi, il n'y aura jamais d'accusatif après les prépositions de lieu *ĝis* ou *al*, car elles indiquent déjà par elles-mêmes le mouvement.

Bien sûr, il y a le problème des mots-écrans, comme dans la phrase de notre demandeur: *Tio donas al mi malfacilecon*. Les mots-écrans ne sont pas un concept grammatical, mais didactique: on s'en sert pour expliquer pourquoi on fait des erreurs dans certaines circonstances. Dans le cas qui nous intéresse, le complément direct est séparé du verbe par un autre complément: *al mi*. Ça ne change pas du tout le sens de la phrase, mais on en oublie plus aisément de mettre l'accusatif, qui vient le plus souvent directement après un verbe: *Tio donas malfacilecon al mi*. On voit d'ailleurs des accusatifs mis à tort et à travers dès qu'un nom vient après un verbe, dans les cas d'inversions ou lorsqu'il s'agit d'un attribut.

Quelques règles

Donc, hors les prépositions de lieu, jamais d'accusatif chez un mot introduit par une préposition. On doit donc dire: *Li trinkas multe da biero*. Ou bien, pour plus de clarté: *Li trinkas multan bieron, li trinkas multajn glasojn da biero*.

Jamais d'accusatif pour un attribut, donc après des verbes tels que *esti*, *ŝajni*, *iĝi*, *fariĝi*, *resti*, *montriĝi*, *aperi*, *aspekti*, en fait tous

les verbes qui posent une identité ou une similitude entre sujet et attribut: *Mi estas homo*, mais *leono manĝis homon*.

Jamais d'accusatif devant des verbes intransitifs (comme *morti*, *situi*, *okazi*, *ĝoji*, *vivi*, *danci*, *dormi*), dont tous les verbes finissant par *-iĝi*.

Et attention aux cas d'inversions (*mian amikon murdis la fulo*) ou de mots-écrans qui nous font oublier la fonction de chaque mot.

Autres usages de l'accusatif

Nous n'avons parlé jusqu'ici que des accusatifs complément direct et de direction. Or, pour rendre les choses *intéressantes*, on peut utiliser l'accusatif pour bien d'autres choses, ce qui rend passablement inutiles tous les trucs mentionnés ci-haut. En fait, l'accusatif peut remplacer, lorsque le sens le permet, à peu près n'importe quelle préposition (mais à peu près jamais, pour une question de sens, justement, *de* et *el*).

Principalement, on utilise l'accusatif pour montrer un durée (*mi flugis ses horojn al Eŭropo*), un moment (*la 22^{an} de Junio, venontan dimanĉon*), mais pas l'heure, car il y aurait confusion entre les dates et les heures, les mesures en général (*li pezas 90 kilogramojn kaj estas du metrojn alta; Kebeko situas 250 kilometrojn de Montrealo*), la position (*li staras la kapon malsupre*). Dans tous les cas, on peut trouver une préposition que remplace l'accusatif: *mi flugis dum ses horoj, en la 22^a de Junio, en dimanĉo, li havas pezon je 90 kg, je 250 km, li staras kun la kapo malsupre*.

Évidemment, puisque l'accusatif montre la direction même en présence d'une préposition (mais, répétons-nous, jamais avec *al* ou *ĝis*), il peut très bien la montrer sans: *mi iras Kebekon, mi eliras la buson...*

Les choses sont-elles plus claires, F.G.? J'en doute, mais console-toi en te disant qu'il existe des langues avec bien plus de cas et, en plus, des déclinaisons irrégulières, et que les enfants maîtrisent le tout fort facilement. Et en te disant aussi que l'accusatif permet de changer l'ordre des mots dans la phrase et donc de mettre l'accent sur tel ou tel mot. Mais peut-être est-ce trop cher payer, au vu des erreurs que font même les espérantistes chevronnés.





Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

La manĝoj en MEDO estas bona ebleco gustumi ion novan. Se vi planas veni, ni petas ke vi pretigu aŭ aĉetu ion laŭ la vespera temo. Necesas anonci vian alvenon kelkajn tagojn antaŭe, se vi volas partopreni : informo@esperanto.qc.ca.

Samtempe informu nin pri kion vi planas kunporti. Vi povas ankaŭ alporti tipan trinkaĵon. Atentu ke temas pri bufedeca manĝo. Eblos varmigi manĝojn forne aŭ mikroondforne.

Pensu ankaŭ pretigi ion pri la temo por la vespera babilado. Kompreneble se vi ne deziras kunmanĝi, vi estas bonvena je la 20-a horo.

Si vous désirez participer aux repas communautaires thématiques, vous devez apporter un mets. Vous devez également confirmer votre présence quelques jours avant, en mentionnant le nom du plat. Si vous ne désirez pas participer au repas, vous êtes le bienvenue à partir de 20 heures.

Tago	Dato	Horo	Loko	Ĉe la menuo..
Vendredo	27-a de marto, 2009	19 h	MEDO	Zingibro, varma spico por vintra tempo
Vendredo	24-a de aprilo, 2009	18 h	MEDO	Latina Ameriko komuna manĝo
Vendredo	29-a de majo, 2009	18 h	MEDO	Azia vespero komuna manĝo
Vendredo	26-a de junio, 2009	19 h	Commensal	Monata renkontiĝo
Vendredo	25-a de septembro 2009	19 h	Commensal	Monata renkontiĝo
Vendredo	30-a de oktobro 2009	18 h	MEDO	Germana vespero komuna manĝo
Vendredo	27-a de novembro 2009	18 h	MEDO	Slava vespero komuna manĝo
Sabato	12-a de decembro 2009	18 h	Commensal	150-a datreveno de L.L. Zamenhof

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

16-18 ^a de majo 2009	6 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Toronto, Ontario
10-12 ^a de oktobro 2009	16 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
22-24 ^a de majo 2010	7 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Tririvero, Kebekio
9-11 ^a de oktobro 2010	17 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
21-23 ^a majo 2011	8 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 ^a majo 2012	9 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio

kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à : riverego@esperanto.qc.ca

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8
 (Vidu retejon por vidi kiel atingi)
 (Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement.

Service de librairie postale à Montréal

Atentu ke la libroservo de KEA estos fermita de la mezo de junio ĝis la fino de septembro.
 Bondeziras al vi belan someron!

Service de librairie postale à Montréal

Le service de librairie postale sera fermé de la mi juin à la fin septembre. Merci de votre compréhension. Bonne saison estivale!
www.esperanto.qc.ca/katalogo

MEMO

Montreala Esperanto-Movado : www.esperanto-montreal.org